

N. N. 32,

Elkreskis roz-
branĉeto*tradukita de Joachim Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto
el rozarbust' de Di'.
Aŭguro de profeto
rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloreto
meze en vintra nokto
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -
Jesaj' prognozis ĝin -
el sia korpo sproson
Mari' la virgulin'.
Laŭ dipotenca vol'
ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto
tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto
forprenas nun de ni.
Vi hom' kaj vera Di'
el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.

*Traduko de la Germana
poemo "Es ist ein Ros
entsprungen" de N. N. 32
en Esperanton de JOACHIM
GIESSNER (*1913-12-23 -
†2003-11-25).*

*Arg-618-1244 (2012-10-18
21:24:22)*

*Tiu ĉi poem-traduko tro-
viĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub
<http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.*

N. N. 32,

Rozbranĉo
forĝermadis*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis
el trunk' de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jiŝaj ĝia spec'.
Floreton portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita
Jesaja de profet':
Maria netuŝita,
de kiu la floreto'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro
alvenas bonodor'
Ĝi brilas en la koro,
mallumon pelas for.
Homido, Dia Vort',
nin el sufero helpas,
De pek' Savant' kaj mort'.

*Traduko de la Germana poemo
"Es ist ein Ros entsprungen" de
N. N. 32 en Esperanton de Felix
Ney.*

*Arg-618-1246 (2012-10-18
22:27:59)*

*Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la
retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbranĉo1.html>.*

N. N. 32,

Es ist ein Ros entsprun-
gen

1. Es ist ein Ros entsprungen
aus einer Wurzel zart,
wie uns die Alten sungen,
von Jesse kam die Art
und hat ein Blümlein bracht
mitten im kalten Winter,
wohl zu der halben Nacht.

2. Das Röslein, das ich meine,
davon Jesaja sagt,
ist Maria die reine,
die uns das Blümlein bracht.
Aus Gottes ewgem Rat
hat sie ein Kind geboren
und blieb ein reine Magd.

3. Das Blümlein so kleine,
das duftet uns so süß,
mit seinem hellen Scheine
vertreibt's die Finsternis:
Wahr' Mensch und wahrer Gott,
hilft uns aus allem Leide,
rettet von Sünd und Tod.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas N. N. 32.*

Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)

*Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la
germana evangelia eklezia kantlibro,
kanto n-ro 23. Vidu ankaŭ la retejon
[http://de.wikipedia.org/wiki/
Es_ist_ein_Ros_entsprungen](http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen). -
La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo
[http://ingeb.org/spiritua/
esistein.html](http://ingeb.org/spiritua/esistein.html). Tie estas aŭdebla
ankaŭ la melodio.*